

Eble povus plibeligi viajn tagojn regula renkontiĝado kun afablaj gesamideanoj, dum lernado. La fama **Jagelona Universitato en Krakovo, Pollando**, proponas al esperantistoj de la tuta mondo tri diversajn kursojn.

kurso 1

Kuraĝe korektu viajn lingvajn erarojn

Estas iom hontige fari tro multajn erarojn... Agrable kaj kuraĝe korektu ĉiajn malperfektaĵojn en via lingvouzo, sub gvido de instruistino. Vi ricevos multe da helpo pri la individua uzado de la lingvo.

kurso 2

Kurso por verkemuloj

Ripeto de la sukcesa kurso el la pasinta jaro. Por verkantoj de diversaj tekstoj. La skribaj aktivaĵoj ampleksos leksikon, gramatikon, donos specialan atenton al sintakso kaj zorgado pri stilo. La programo respektos la individuan stilon de la partoprenantoj, okazos laboro pri ties disvolvado, krome, lernado per la stilo de modelaj verkintoj de la Esperanto-literaturo.

kurso 3

Kompreni la lingvaĵon de aŭtoroj de esperantaj beletraj verkoj kaj lerni la lingvon per literaturo

Kurso por kiu? Por ŝatantoj de literaturo, por legemaj personoj, fakuloj pri beletro, esploristoj (vidi unikan, aŭtoran metodon).

La partoprenantoj enprofundiĝos en tekstojn por vidi, kion la aŭtoroj reale diras (ne „volis diri”, kiel oni ofte diras en lernejoj), kiel ili esprimas ideojn, emociojn ktp. per vortoj. Oni esploros la fundon de la tekstoj. La lernado multe pliriĉigos la komprenon de beletro kaj influos la kapablon de la partoprenanto verki.

5-monataj kursoj (ekde la komenco de januaro 2021), kun lecionoj okazantaj 1-foje semajne.

La **oficialaj konfirmiloj** pri la partopreno enhavas krom la konfirmo kaj blazono de la universitato, la markon de la prestiĝa, internacia EAQUALS-kvalito de la Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato, kio plialtigas ilian internacian prestiĝon.

Limdato por aliĝi: 20 decembro 2020 (eblas ankaŭ poste, laŭ disponeblaj lokoj).

Pli da informoj pri la kursoj: <https://bit.ly/37MIYye>
(aŭ <https://docs.google.com/document/d/1JvimMeNl-nc3VJhi44f6NjzDuaZvepiVRI0BYdEW5c/preview>)

Se, studinte ĉiujn informojn en la ĉi-supre indikita retpaĝo, vi decidis **ALIĜI**, bv. skribi al: [esperanto.instruado.jag.univ.pl\(ĉe\)gmail.com](mailto:esperanto.instruado.jag.univ.pl(ĉe)gmail.com) (ni publikigas la adreson de la kursoj en tia kontraŭ-spama formo).

Invitas vin kore

Maria Majerczak

Gvidantino de la Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato